



8-6-1974

CGC N°

00406 504/1000-06

Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA - DISTRITO FEDERAL

Sede: Edifício Jockey Clube, sala 103

Setor Comercial Sul

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalho, 31 - AP. 73

Telefone 4-8033

11.100 - Santos (SP)

SECRETARIA

Caixa Postal 07 - 1182

Telefone 226-1298

70.000 - Brasília (DF)

MARÇO/ABRIL DE 1980

ÓRGÃO OFICIAL DO BKE

BOLETIM N° 53

Redação: MARIA ALMADA

1-A KONGRESO DE BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO

Post ĝia kvinjara ekzisto, Brazila Konsilantaro de Esperanto okazigis sian unuan kongreson en la urbo Juiz de Fora (MG), kunlabore kun Kultura Asocio de Esperanto de Juiz de Fora, de la 3a ĝis la 6a de aprilo 1980.

Patronis la eventon la rektoro de la Federacia Universitato de Juiz de Fora, prof-ro Sebastião de Almeida paiva.

La honora prezidanto estis la urbestro de Juiz de Fora. D-ro Francisco Antonio de Mello Reis.

Prezidanto de la kongreso estis prof-ro Francisco de Souza Almada.

Vic-prezidantoj: Prof-ro José Passini kaj Kleber Halfeld.

La temo de la kongreso estis "Kunlaborado".

La loka komitato:

Prezidanto: Orlando Lopes Junior

1-a Sekretario: Reinaldo Zaghetto

2-a Sekretario: Weima Watson Renault

Kasisto: Marija Pozder Almada

Oficiala oratoro: Prof-ro Nelson Pereira de Souza

Generala kunordiganto: Carlos Augusto Siqueira da Cunha

Aliĝis al la kongreso 99 personoj el la jenaj ŝtatoj: Rio de Janeiro, Minas Gerais, São Paulo, Distrito Federal, Goiás, Rio Grande do Sul, Bahia kaj el Usono, s-ano Jack Lesh.

Unu triono de la ĉeestantaro estis ju-

nuloj el malpli ol 25 jaroj. Pro manko de komuna loĝejo ne aperis pli da ĝejnuloj. Same malhelpis niajn gesamideanojn la malfacila vojaĝebleco. Laŭ aŭtaŭvidite en la programo de nia kongreso ĉeestis la jenaj specialaj invititoj: S-ino Ursula Grattapaglia, direktorino de UEA por Sudameriko; Inĝeniero Giuseppe Grattapaglia, ĉefdelegito de UEA por Brazilo; D-ro Braz Cosenza, prezidanto de Kultura Kooperativo de Esperantistoj. Prof-ro Syllas Chaves, prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo, ne aperis kaj ne sendis reprezentanton.

La 3-an de aprilo, je la 20:30 horo okazis la solena inaŭguro, en la belega kaj komforta Nobla Salono de la Rektorejo de la Federacia Universitato de Juiz de Fora, farita de la prezidanto de la L.K.K., Orlando Lopes Junior, kiu transdonis la parolon al prezidanto de Brazila Konsilantaro de Esperanto, Prof-ro Francisco de Souza Almada, kiu mal-longe salutis la aŭtoritatulojn kaj ĉeestantaron, dankante samtempe al ĉiuj, kiuj ĝentile kontribuis por la okazigo de la evento.

Parolis post li la prof-ro Pro-Rektoro Lucas Marques do Amaral en la nomo de la Rektoro Patrono Prof-ro Sebastião Almeida Paiva, forestanta pro vojaĝo al Eŭropo.

Sekvis kun la parolo D-ro Francisco Antonio de Mello Reis, indega urbestro de Juiz de Fora kaj Honora Prezidanto de la kongreso. Li laŭdis la eventon, kiun li

trovis tre interesa por promocii la urbon, ĝin elstarigante inter tiuj, kiuj aprobas Esperanton.

Lia parolado estis forte aplaŭdita.

Parolis poste Prof-ro Nelson Pereira de Souza, oficiala oratoro, kiu utiligante Esperanton, faris laŭdindan paroladon elstarigante la laboron de nia Majstro Zamenhof, kiu ebligis pere de la internacia lingvo pli facilan kontakton inter la popoloj.

Fojfoje André Luiz Fausto de Souza kaj Kim Ribeiro bele muzikis por la ĉeestantaro, kiu ilin aplaŭdis entuziasme.

Rememoriginte la forpasintajn Esperanto-pionirojn de Juiz de Fora, Reinaldo Zaghetto proponis unuminutan silenton kaj faris la biografion de Isaltino da Silveira Filho, unu el tiuj pioniroj.

La 4-an de aprilo, matene, prelegis Prof-ro Almada pri la verbaj participoj.

Postsekvis Delio Pereira de Souza, direktoro de la "Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz", kiu parolis pri la brazilaj geografiaj nomoj en Esperanto.

Elvira Fontes, prezidantino de San-Paŭlo Esperanto-Asocio parolis pri Esperanto en la Fakultatoj, ricevinte ĝenerallajn aplaŭdojn.

Sekvis kunveno de la estraro de la organizoj, kiuj promociis la kongreson.

Vekis intereson la klarigo pri la 66-a U.K., farita de S-ino Ursula Grattapaglia, ĵus alveninta el Eŭropo. Ŝi invitis la esperantistaron amase partopreni la UK-on en la venonta jaro kaj tuj komenciĝis la enskribiĝoj de la anaro, kies nombro pli kaj pli kreskas.

Giuseppe Grattapaglia menciis la gravecon de la nuntempa kunlaborado de la delegita retco en nia lando. Estas necese aktivigi ĉiujn esperantistojn kaj allogi simpatiantojn. Propagandi pri la venontjara evento en la naciaj gazetoj, organizi kursojn, kaj rekruti novajn individuajn membrojn por UEA. La ĉefdelegito kalkulas je almenaŭ mil da geesperantistoj, kiuj povas eluzi la nuntempan aliĝkotizon, gajnante 30% da rabato.

Vespere en la sama tago okazis la oratora konkurso. La unua premio estis aljuĝita al junulo Pedro Albeirici da Rocha kaj la 2-a al f-ino Neima Adorno.

Post la konkurso okazis kultura vespero, dum kiu Maria Almada prelegis pri pasko, lotinte samtempe paskajn ovojn

kaj artaĵojn.

Sabaton matene estis inaŭgurita la busto de Zamenhof en la Placo Jardim Gloria, tre bela loko elektita de la organizintoj de la kongreso.

Poste, je la 2:30 Prof-ro Inĝeniero Alberto Flores prelegis pri "Esperanto, Evangelho e Espiritismo" en la "Casa Espírita", ĝentile disponigita de S-ino Eunice de Mattos, prezidantino de la organizo.

Samtempe, en la Rektorejo, prelegis s-ano Ivon Barbosa pri la instruado de Esperanto kaj uzitaj sistemoj.

Fine da la labortago s-ano Nelson Pereira de Souza legis la statutprojekton de BKE, disdonis ekzemplerojn al la reprezentantoj de la societoj konsistigantaj ĝin, por pristudado de ĝia enhavo kaj propono de modifoj kaj klarigoj interesaj.

Tiel finiĝis la labortago.

Vespere s-ano Maria Almada prelegis pri "Sekso-Egaleco", temo kiun la ĉeestantaro pritraktis kun granda intereso. Post mallongaj debatoj, kiujn partoprenis ankaŭ la viroj, estis lotitaj pentraĵoj de F-ino Maria José Mendonça, s-ino Aderita Neto de Paula kaj Maria Almada.

Por briliĝi la fermon de la laboroj s-anoj André Luiz Fausto de Souza kaj Kim Ribeiro denove ludis belegajn muzikojn.

Dimanĉon matene okazis la katolika diservo en la pitoreska preĝejo "São Sebastião" meze de ĉarma parko. La meson celebris pastro Pedro M. Urbaitis, kun kvin neesperantistaj pastroj. Krom la kongresanoj partoprenis la meson granda nombro da neesperantistoj.

La meso komenciĝis pere de legado de la unua strofo de "Preĝo sub la Verda Standardo", de Zamenhof, farita de Maria Almada, kaj finiĝis pere de kanto de la Espero kaj katolika Himno en Esperanto.

La nekonata lingvo vekis grandan intereson inter la juizforanoj, kiuj la unuan fojon ĝin aŭdis.

La esperantista pastro Urbaitis faris utilan propagandon pri la internacia lingvo, dirinte, ke pere de ĝi la homaro iĝos pli frata kaj paca. Li menciis, ke la papo Paulo la 11-a apogas kaj parolas Esperanton.

Post la meso okazis rondpromenado tra la urbo kaj komuna tagmanĝo.

LA RESUTADO DE LA KONGRESO

I - Ampleksa disvastigado de Esperanto

en la universitata urbo Juiz de Fora kaj ĝia regiono pere de radio kaj gazeto "Diário Mercantil";

- II - Organizas kurson pri la internacia lingvo la "Casa Espfrita", subtenata de ĝia direktorino Eunice de Mattos;
- III - Komenco de enskribiĝo por la 66-a UK;
- IV - Oficiala kunvoco de la landaj organizaĵoj, por labori kune kun BKE sur ĉiuj kampoj.
- V - Ampleksigi la interrilatojn kun BEJO.

PROPONO

Laŭ propono de D-ro Alberto Flores, la assembleo kunveninta en la urbo Juiz de Fora, dum la Unua Kongreso de Brazila Konsilantaro de Esperanto (B.K.E.) decidis aprobi la jenon:

- 1 - B.K.E. estas preta ĉiel kunlabori, laŭ sia kapablo, kun ĉiuj Esperantistaj organizaĵoj, ĉu naciaj aŭ internaciaj, ĉu lokaj aŭ fakaj;
- 2 - B.K.E. estas preta starigi kontrakton kun la naciaj societoj por konsulto kaj kunlaboro en ĉiuj aferoj de nacia intereso de la neŭtrala movado en Brazilo;
- 3 - B.K.E. estas ĉiam preta kunhelpi ĉiujn esperantistajn societojn en Brazilo, al ĝi aliĝintajn;
- 4 - La Estraro de B.K.E. devas komuniki al ĉiuj societoj en Brazilo ĉi tiun decidon.

La Propona Komisiono:
Inĝeniero Alberto Flores
Prof-ro José Passini
Prof-ro Delio Pereira de Souza

Juiz de Fora, la 5-an de aprilo, 1980

- x - x - x - x - x - x -

KIAL NUR LA ANGLA LINGVO?

M. Belmonte de Abreu

Kial studento, kandidato al por-enira ekzameno ĉe Filozofiaj Fakultatoj en Brazilo estas devigataj koni la anglan lingvon?

Ĉu al li ne sufiĉas plene koni ian ajn lingvon krom la angla? Kial brazilana leĝo

kondiĉas al la kandidatoj liberan elekton de fremdaj lingvoj?

Verdire tio okazis al studento Eleus Leonardo de Sá, en la brazilana urbo Ilhéus (BA). Sin pretiginte al por-enira ekzameno por beletra profesoro, li elektis la hispanan lingvon, kiun li bone konas, sed la estraro de la Fakultato ne permesis tion kaj postulis, ke li konu la anglan lingvon.

La leĝo permesas al kandidato liberan kolekton pri fremda lingvo, li elektis la hispanan, kiu estis rifuzita de la Fakultato. Li perdis unu tutan jaron por studi la anglan, ĉar la hispana ne estis akceptita en por-enira ekzameno.

Al kio servas, do, la artikolo en la leĝo pri nedeviga kolekto? Tiel estas okazo por nuligi tiun artikolon kaj kondiĉi alian, kiu devigos nur la konon de la angla lingvo. Tiel la kandidato estos anticipe informita pri la deviga ekzameno kaj firme sin preparos tiucele.

Studento Eleus, kiu bone scipovas Esperanton, vere unu el la plej larĝaj scioj, kiujn oni povas akiri pri lingvoj, tre klopodas antaŭ Ministerio por Edukado kaj Kulturo de Brazilo pledante al studento, kiu jam scipovas unu fremdan lingvon, inkluzivante Esperanton, ke li ne plu devos fari ian ajn por-eniran ekzamenon pri lingvo. Tial li petas al la altkleraj esperantistoj nialande, ke ili pledu antaŭ la Ministro por Edukado, ke li permesu al studentoj fari por eniran-ekzamenon pri lingvo al li pli konvenan.

BKE jam estas pritraktanta la aferon en Brazilia pere de la ĝenerala Sekretario.

- x - x - x - x - x - x -

MONO RICEVITA

Ni ricevis la jenajn kontribuojn:

De João Fonseca	100,00
De Kleber Halfeld	400,00
De F.S. Almada - libroj venditaj	300,00
De Walter Francini	200,00
De Mozar de Andrade	200,00
De Elvira Fontes	150,00
De Claudio Zimmermann	150,00
De Bráulio Fantinato	500,00
De Yolanda Araujo Costa	500,00

- x - x - x - x - x - x -

**RELATORIO FINANCEIRO DO 1º CONGRESSO DE ESPERANTO DO CONSELHO
BRASILEIRO DE ESPERANTO COM A ASSOCIAÇÃO CULTURAL DE SEPERAN:
TO DE JUIZ DE FORA - DE /3 a 6/IV/1980:**

INSCRIÇÕES:

2 de C\$ 50,00	100,00
22 de C\$ 100,00	2.200,00
8 de C\$ 200,00	1.600,00
33 de C\$ 300,00	9.900,00
34 de C\$ 400,00	13.600,00
Donativos	1.200,00
Arrecadado	28.600,00

DESPESAS:

Nota 23361 de Centro de Copias "Cerqueira"	1.175,00
Idem de Boutique PINTA O SETE - flâmulas	2.400,00
Idem de GEDRAL-Gráfica e Editora Ltda.-Convites	520,00
Gratificação a contínuos da Reitoria	1.000,00
Prêmios do Concurso de Oratória	1.600,00
Nota do Tesoureiro:	
NF 435777 - 200 Crachás	500,00
NF 32047 - 3 Cxs. de lapiseiras e pincel	374,50
S/n - 50 Xerox de "La Espero"	200,00
NF 400299 - 1 Cx. taxinhas 2 2 fls. papel	28,00
S/n postagem de 664 programas expedidos	1.062,50
NF 59703 1.500 fls. papel (3 resmas)	621,00
NFS 1944 Plásticação de 200 pastas	260,00
Doc. 84568 Despacho de pacote c/programas	109,00
Recibo s/nº de 1000 programas	3.000,00
	6.255,00
	12.950,00

RESUMO:

ARRECADADO	C\$ 28.600,00
DESPENDIDO	C\$ 12.950,00
SALDO	C\$ 15.650,00

Parte da A.C.E.J.F.	C\$ 7.825,00
Idem do C.B.E.	C\$ 7.825,00

Maria Almada - Tesoureira

Maria Almada

LINGVA PRIKOMENTO

D.W. - Argentinio

"Nia laboro ĉesigiĝis" devas esti "ĉe-sis". "Ili venis en la ĝardeno"; ĉi tiu frazo estas tute bona, sed ĝi multe diferencas de la frazo: "Ili venis en la ĝardenon". La unua frazo signifas, ke ili jam estis en la ĝardeno, sed nun ili venis al mi. La dua frazo signifas, ke ili antaŭe estis ekster la

ĝardeno, sed nun ili enpaŝis, eniris en la ĝardenon, en kiu mi estas.

Hieraŭ vespere estis veninta al mi homo kun verda stelo kaj diris "bonan vesperon". La frazo estas tre peza pro la superflua formo "estis veninta". Ni klopodu paroli ĉiam en vera Esperanto ne kopianta sklave la gramatikajn formojn de aliaj lingvoj. Do ni diru "venis al mi homo...". "Li rapidis sin hejmen". La vorto "sin" ĉi

tie estas tre malĝusta. Oni diru "Li rapidis hejmen". Ili metis la tablon kaj seĝojn sub la florantaj branĉoj de la arbo"; korekte "sub la florantaj branĉojn". "La straton lumigis eĉ ne la plej malforta lampo". La ĝusta vortordo estas: "La straton ne lumigis eĉ la plej malforta lampo". Ne estas egale, kie staras la vorto "ne". Ĝi devas estis ĉiam antaŭ la neata vorto. Ĉi tie la vorto "lumigis" estas neata, do ni devas diri "ne lumigis". "En la pafilo ne funkciis la pinglo, pro tio li ne povis pafi". La vorto "pinglo" ne estas sufiĉe klara ĉar temas pri speciala vorto kaj tiu estas "perkutpinglo". Ĝi frapas la kartoĉon en la pafilo kaj tiu eksplodigas la pulvon en la kartoĉo. Estas metala uĵeto, kiu entenas pulvon kaj en kiu enestas kuglo. En medicino "perkutilo" la martelo (france: marteau de medicin). Perkutinstrumento = frapinstrumento.

- x - x - x - x - x - x -

NI KONDOLENCAS

Kun bedaŭro ni komunikas la forpason de nia kara samideano Dragutin Wranka, en Argentino. Elstara esperantisto Wranka, jugoslavo, 1948 envenis Brazilon, kie li loĝis dum kelka tempo, lasinte multajn amikojn. Fine li translokiĝis al Ĉilio. Poste li envenis Argentinon, kie li loĝis ĝis sia morto. Kiel niaj ĝelernantoj rimarkis, li estis la verkinto de la rubriko "Lingva Prikomento" dum multaj monatoj; kaj ni ankoraŭ havas publikigendan materialon de li senditan.

Sano Wranka senĉese laboradis por Esperanto. Li reviziis la monatan periodaĵon "Rio Esperantista" redaktitan de s-ano Delio Pereira de Souza kaj plurajn librojn eldonitajn en Brazilo.

En Argentino li daŭrigis sian nelasigeblan laboron por la internacia lingvo, instruis ĝin dum multaj jaroj.

Ni sincere kondolencas lian edzinon Serafina P. Wranka.

Ni ankaŭ kondolencas la edzinon kaj familianojn de nia kara samideano Oscar Leite de Arruda, kiu forpasis en la 21-a de februaro kiam riposis en "Águas do Prata".

GAZETOJ RICEVITAJ

Suda Stelo, Boletim Monastica, Esperanto Notícias, 2º Boletim de Alagoas, Informilo de SEK, Cerqueira Centro de Cópias - Informativo, Esperanta Lumo, O NOSSO, Interligação, Espero Katolika, A Voz da Cidade, Correio Fraternal do A.B.C., Candeia, Folha de Caçapava, A Caminho da Luz, Sul do Estado, ZET - el Jugoslavio, Diário de Jacareí, Turismo Esperanto-Kalendaro 1980, Sinais de Rumo kaj Flava Folieto.

- x - x - x - x - x - x -

SPIRITA ELDONA SOCIETO

En tiu eldonejo oni povas akiri vere altnivelajn legaĵojn. Laste aperis la libro "La Prediko sur la Monto, de Huberto Rohden, reviziita de nia ĵus forpasinta s-ano Dragutin Wranka, el Argentino. Ni ricevis ekzempleron kaj ĝin konservas kiel memorigaĵon.

Bilanco de la unua semestro - Enspezo: Antaŭa saldo Cr\$ 4.888,63; Kotizoj Cr\$ 17.973,88; Libroj Cr\$ 8.504,37; Elspezoj: Cirkuleroj Cr\$ 370,00; Poŝtmarkoj Cr\$ 4.578,00; Libroj aĉetitaj Cr\$ 12.745,84; Posta saldo Cr\$ 11.633,04; Sumo Cr\$ 31.366,88.

- x - x - x - x - x - x -

BELO HORIZONTE (MG)

De nia s-ano D-ro Helio F. Aderne, kiu fondis la "Clínica Esperanto" en tiu urbo ni ricevis leteron petante, ke ni publikigu kelkajn adresojn de hungaraj samideanoj. Temas pri medicinaj studentoj, flegistoj kaj kuracistoj, kiuj deziras korespondi kun samfakuloj de Brazilo.

La nomoj de la interesatoj estas: Molnár Mária, flegistino, el Budapeŝto III. Meggyfa u. 27. I/6.H-1033; Marczis Zsuzsanna, Budapeŝto VIII. Rozgonyi u. 2-6. III/33, II.lh. H-1089. Molnár Ferenc, Budapeŝto V. Tikovits M.U.3-5.III/4-H - 1052, Hungario. Moskovics Sándor, Budapeŝto VIII Gyarmat u.58, H-1145, Hungario.

- x - x - x - x - x - x -

La Baha'a Esperanto-Ligo, kiu estas unu el la konsistigantoj de BKE, estis reprezentita ĉe la Kongreso de la s-ino Leonora Armstrong. Ŝi estas unu el la konsilantinoj de la Baha'a kredo por la Latina-meriko.

S-ino Armstrong aperis ĉe la esperantejo kune kun grupo de gejunuloj spite de ŝia nekontentiga sanstato. Ŝi interalie diris, ke la filino de Zamenhof, s-ino Lidia, estis favora al la Baha'a kredo. S-ino Armstrong envenis Brazilon en la jaro 1921-a kaj parolis Esperanton tiutempe. Ŝi en sia salutparolado substrekis, ke Esperanto estas la ilo, kiu unuigas la homaron en paca frateco.

Grupo de Baha'a junularo favoras al Esperanto kaj promesis ĝin lerni ĝis la okazigo de la 66-a U.K. venontjare.

- x - x - x - x - x - x -

VOLTA REDONDA (RJ)

La 14-an de marto okazis renkontiĝo en tiu progresema urbo, kiun per s-ano Syllas Chaves, D-ro Albe Wilson Deslandes, s-ino L. Deslandes, Francisco kaj Maria Almada.

Tiukaze nia s-ano Alberto Flores transdonis al ni afikson pere de kiu li propagandas pri senpaga Esperanto-kurso, gvidata de li kaj prof-ro Marcos Baylão, en la spiritisma centro — "A Caminho da Luz", ĉiudimanĉe de la 9:30 ĝis la 11-a horo.

Ni gratulas al niaj senlacaj batalantoj kaj deziras plenan sukceson.

- x - x - x - x - x - x -

NI DANKAS!

Multaj bonaj gesamideanoj estis malhelpitaj partopreni nian Kongreson, sed sendis al ni gratulleterojn aŭ telegramojn, ili estas: S-no Olsen Bento da Cruz, el Paraná; D-ro Ivo Sanguinetti, el Porto Alegre (RS), kies mesaĝo enhavis naŭ subskribojn; Vivaldina Caymmi, el Salvador (BA); Benedito da Silva, el Monte Aprazível (SP); Yolanda de Araujo Costa, el Rio de Janeiro (RJ); D-ro Helio Aderne, el Belo Horizonte (MG); Prof-ro João Fraga Padilha, el Bauru (SP). Ni kore dankas al ĉiuj.

VISITO

Nian redakcion vizitis la atestimataj s-anoj Braulio Fantinato kaj João Masiero, el San-Paŭlo. Ili kunportis du belegajn filmojn dokumentantajn la 11-an kaj 12-an Seminariojn okazintajn en Brazilja kaj Santos. Ambaŭ estis projekciitaj kaj ni havis okazon revidi scenojn de ambaŭ okazintaĵoj. La filmo pri la Santosa Seminario aperigis nian karan nepinon Rosely Almada, kiu tiam ekspoziciis siajn pentraĵojn kune kun tiuj de sia patrino; kiel ni jam informis ŝi forpasis antaŭ nelonge. La familio Almada kortuŝe dankas la afablecon al la s-anoj Fantinato kaj Masiero.

- x - x - x - x - x - x -

LASTTMOMENTE!

San-Paŭlo (SP) — La prezidanto de BKE ricevis la jenan komunikon de la prezidantino de San-Paŭlo Esperanto-Asocio: "Plezure mi ŝchiigas vin, ke dum la estrarkunveno de SPEA okazinta la 12-an de la nuna monato, oni registris en la protokolon, pro la sukceso de la 1-a Esperanto-kongreso de BKE, laŭdon al ĝiaj organizantoj.

Petente, ke vi bonvole informu pri tio al la interesatoj, mi salutas - Altestime — s) Elvira Fontes — Prezidantino".

Ni dankas la apogon.